

# *La Riverego* kebekia esperantista bulteno

Januaro 2004

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 18, N. 75

## Invito partopreni en komuna kongreso de ELNA kaj KEA

Vi estas invitataj partopreni en rara komuna kongreso de ELNA kaj KEA (Usono kaj Kanado). Ĝi okazos de la 16<sup>a</sup> de julio (vendredo) ĝis la 19<sup>a</sup> (lundo).

La loko estos Sidney, Brita Kolumbio, Kanado, urbeto norde de Viktorio sur la spektakla, belega Vankuvera Insulo. La kongresa loko estas survoje al la UK en Pekino la postan semajnon. Fakte, oni povas partopreni en speciala postkongresa ekskurso sur la insulo kaj en la urbo

de Vankuvero, sur la ĉeftero, antaŭ ol flugi al Ĉinio por la universala kongreso.

La TTT-ejo [www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/](http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/) donas multajn detalojn pri la kongreso: kongresejo, loĝejoj, Sidney, aliaj proksimaj kaj vizitindaj urboj (Seatlo, Viktorio, Vankuvero), transportado, aliĝilo, ktp, en tri lingvoj (Esperanto, angla, kaj iom en la franca).

Jen kelkaj elŝuteblaj dokumentoj en PDF-formato:

> a.. Anonco (Esperanto):  
[www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/anonco1-eo.pdf](http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/anonco1-eo.pdf)

> b.. Anonco (Angla):  
[www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/anonco1-en.pdf](http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/anonco1-en.pdf)

> c.. Anonco (Franca):  
[www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/anonco1-fr.pdf](http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/anonco1-fr.pdf)

> d.. Postkongresa ekskurso:  
[www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/ekskurso.pdf](http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/ekskurso.pdf)

> e.. Aliĝilo:  
[www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/alighilo.pdf](http://www.esperanto.org/ELNA/kongreso2004/afishoj/alighilo.pdf)

Se vi havas proponon por programero, bonvolu anonci vin al la organiza komitato ĉe [arlynkerr@earthlink.net](mailto:arlynkerr@earthlink.net).

## For la telefon'!

**Nova viktimo de la Reto: la telefono. Dum la lastaj jaroj, la Esperanto-Societo Kebekia ĉiam ricevis pli kaj pli da retleteroj, kaj la kvanto da telefonvokoj malkreskis samproporcie. Lasttempe, la Societo preskaŭ ricevis nenian vokon. Tiel, ke lastmonate, la estraro finfine konsentis, ke oni diskonektigu la telefonlinion.**

Tiel, la Societo ŝparos monon, kiun ĝi povis uzi por la varbado de Esperanto kaj la organizado de aktivajoj.

Tio signifas, ke ne plu eblas telefoni aŭ faksi al la Societo.

Sed, kompreneble, ni daŭre respondos la petojn, sed rete, pere de la adreso [esperanto@sympatico.ca](mailto:esperanto@sympatico.ca).

*Résumé: L'augmentation des communications électroniques et la diminution constante du volume d'appels téléphoniques auprès de la Société ont emmené cette dernière à faire débrancher sa ligne de téléphone. Un geste qui, espère-t-on, nous permettra de dégager davantage d'argent pour l'information sur l'espéranto et pour l'organisation d'activités.*

### **Normand Fleury, vicprezidanto de KEA**

La prezidanto de la Esperanto-Societo Kebekia, Normand Fleury, lasttempe fariĝis ankaŭ vicprezidento de la Kanada Esperanto-Asocio. Li tiel povos fari ligon inter la du organizoj.

# Membriĝu en UEA/TEJO

Se vi volas aparteni al la universala unuiĝo de esperantistoj, kiu havas membrojn en 112 landoj de la mondo; laŭ propraj ebloj kontribui al la evoluo de Esperanto en ĉiuj kvin kontinentoj; aldoni al via poresperanta agado internacian nivelon kaj se vi subtenas la statutajn celojn de UEA, tiukaze vi estas invitata iĝi individua membro de UEA aŭ de ĝia junulara sekcio TEJO.

La individuaj membroj de UEA/TEJO ricevas:

- la ĉiumonatan revuon *Esperanto* (Junaj membroj krome senpage ricevas revuojn *TEJO-tutmonde*) kaj *Kontakto* (kategorio "Membro-Abonanto");

- la Jarlibron de UEA, kiu enhavas liston de la kontaktadreso de la Delegita Reto, la plej amasa

internacia kunlabora sistemo de Esperanto-movado kaj multajn valorajn informojn pri la monda E-movado;

- rabatojn ĉe aliĝoj al Universalaj Kongresoj de Esperanto (Internaciaj Junularaj Kongresoj, por junaj membroj) kaj ĉe aĉetoj en la Libroservo de UEA;

- voĉdonrajton por elekti la gvidorganojn de UEA (junaj membroj ankaŭ elektas la gvidorganojn de TEJO), krom la kategorio "Membro kun Gvidlibro". En 2003, en UEA membris 5627 personoj, kio estas je 0,9% malpli ol en la antaŭa jaro.

Ĉekoj: Plej konvenaj estas ĉekoj en eŭroj, usonaj dolaroj aŭ britaj pundoj. Bv. aldoni 10,00 eŭrojn por bankkostoj.

Kreditkartoj: UEA akceptas Mastercard/Access, American Express kaj Visa, interalie. Atentu, ke se vi pagas kreditkarte libroservan

fakturon aŭ kongresan mendon, UEA devas plialtigi la sumon pagotan je 5% pro administraj kostoj, tiel ke ĉe grandaj sumoj, pago per banka ĝiro aŭ ĉeko ofte kostas malpli. Se vi pagas kreditkarte UEA-membrokotizon, kotizon de Societo Zamenhof aŭ Patrono de TEJO, aliĝkotizon de Universala Kongreso, donacon al UEA, aŭ abonon al *Esperanto* aŭ *Kontakto*, debetiĝas al vi nur la kotizo aŭ donaco, sen aldono de 5%. Por pagi kreditkarte ([www.uea.org](http://www.uea.org)), necesas:

\* doni la numeron de via karto,  
\* indiki ties kontrolnumeron, se vi pagas per Visa aŭ Mastercard,  
\* mencii la daton ĝis kiu ĝi validas,  
\* subskribi la peton.

Monbiletoj: Ne ĉiuj biletoj estas ŝanĝeblaj en Nederlando; kelkaj nur je kurzo ne simila al la oficiala kurzo en la lando de emisio.

Internaciaj respondkuponoj: Valoro en Nederlando: 0,726 eŭrojn. Nepre necesas, ke ili estu ĝustaloke (maldekstre) stampitaj.

## Kotizoj 2004 por la kanadanoj

*Ankaŭ ebla pagi sendante ĉekon al la loka peranto por Kanado. Ĉiuj prezoj estas en kanadaj dolaroj.*

**MG (13\$)** Individua membro, kiu ricevas nur la *Gvidlibro tra la Esperanto-movado*

**MJ (33\$)** Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron

**MA (82\$)** Individua membro, kiu ricevas la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*

**Apoga kotizo:**

**SZ (164\$)** Membro de Societo Zamenhof, kiu volas finance apogi la Universalan Esperanto-Asocion

**La loka peranto por Kanado estas**

**Olga Du Temple**

765 Braemar Avenue

North Saarnich

BC V8L 5G5

**La Societo nun  
atingebla ĉe**

**[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)**

Dank' al la laboro de Jérôme-Frédéric Bouchard, la Esperanto-Societo Kebekia nun havas multe pli facile memorigeblan retadreson: [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca).

La antaŭa adreso estis [www.3.sympatico.ca/esperanto](http://www.3.sympatico.ca/esperanto). Tiel, ke ne eblis entajpi ĝin senpere por trovi nin, aŭ memori ĝin post malrapidan rigardon al ia ajn informilon de la Societo.

# Decembra Esperanto-festo

## Zdravka Metz

Zamenhofan tagon oni festas ĉie en la mondo kaj en Montrealo ni festis la 13<sup>an</sup> de decembro, en sabato vespere en Botanika Ĝardeno. La festo komenciĝis per komuna manĝo, kiu kiel ĉiam, estis varia kaj bongusta. Tiu horo kune sidante ĉirkaŭ la tablo ebligis al esperantistoj babilo krom en Esperanto ankaŭ France. La vesperon ĉeestis edzo-edzinoj de esperantistoj de kelkaj membroj same kiel amikoj de Esperanto. Inter ni troviĝis la aŭtoro de la libro *Nanatisis*, Robert Dutil kun siaj du filinoj kaj amiko S<sup>ro</sup> Dufour el Kebeko. De Otavo venis Arono, Karlina kaj Ian. Tiun vesperon ni konatiĝis kun Aleksandro el Rusio, vivinta lastajn jarojn en Parizo kaj kiu planas enmigrigi kun tuta familio en Montrealo. Pli ol dudeko da aliaj

Montrealanoj ĉeestis. Ni povas diri, ke estis vere amika vespero de diversaj nacioj kaj generacioj – Rumeno, Gabrielo kaj Sara vigligis kaj junigis la etoson.

Post la manĝo okazis en apuda salono kultura vespero. Ĝi estis dediĉita al lanĉo de esperanta traduko de libro *Nanatisis*. Zdravka prezentis la aŭtoron, kiu rakontis pri ĉefaj ideoj de la libro kaj pri kial li kontaktis ESK-anojn en februaro 2003. Li deziris, ke lia libro pere de Esperanto, kiel ponto-lingvo, estu tradukita al plej multe da lingvoj. La traduko troviĝos sur la Interreto kaj tiel estus ebla al ĉiu fari la tradukon al propra lingvo. Tio estus lia kontribuo al paco, ĉar la libro portas la ideon de unu monda kaj amika armeo. Ĝi ankaŭ traktas tri ĉiamajn problemojn: libereco, paco kaj ekologio. Karlina, Aleksandro kaj Zdravka legis parton de ĉapitro kiu

ĝuste priskribas tiun ideon. La programo daŭrigis kun aliaj kontribuajoj.

Francesko rakontis mallongan novelon pri Irlando, Daniela recit kantis LaFontaine-fabelon, Mateo recitis poemon, Normando kantigis ĉiujn. Ĉio finiĝis kun komuna fotado kaj bondeziroj por nova jaro.

Por tiuj, kiuj ne forvojaĝis, restis ankoraŭ tempo por plia babilado.

## Grande fête au Jardin

### Normand Fleury

En décembre dernier s'est tenue la grande fête de l'espéranto dans une salle au Jardin botanique de Montréal. La soirée a débuté par un beau souper communautaire (genre buffet). Les conversations multilingues fusaient de toutes parts puisque nous étions heureux d'accueillir les amis ou les membres de la famille des espérantophones.

Par la suite, nous avons procédé au lancement officiel de la traduction en espéranto de l'ouvrage de Robert Dutil, *Nanatisis*. M. Dutil étant présent, il a accepté de nous raconter ce qui l'avait inspiré à écrire ce livre au contenu pacifiste. Zdravka, Charlene et Alexander ont lu des

extraits en espéranto. La soirée s'est poursuivie avec Matthew McLaughlin qui a lu un très beau texte, *Kiam mi aŭdis je la tagfino*, de Walt Whitman.

Comme Noël est la fête de la joie, avec l'aide d'une cassette de Nikolin', *Jula Lando*, les participants ont chanté six chants de Noël de diverses origines, parfois très connus, comme *Tintelet (Jingles Bell)* et *Stela Nokt' (Sainte Nuit)*. Après, Danièle Bédard nous a fait la surprise de savoir *La cigale et la fourmi* de Jean de la Fontaine, en espéranto. Ce fut fort bien rendu. La soirée s'est terminée par diverses conversations amicales entre la trentaine de participants de Québec, d'Ottawa et de la grande région de Montréal.

### NASK 2004 - altnivelaj Esperanto-kursoj en Usono

Inter la 5<sup>an</sup> kaj 23<sup>an</sup> de julio, NASK (Nord-Amerika Somera Kurso) havos lokon en la monde konata interkultura altlernejo The School for International Training (La Altlernejo por Internacia Trejnado) en la nordoriento de Usono.

La instruista skipo pretigis trinivelan studprogramon, kiu emfazas aktivan uzadon de Esperanto en interkulturaj komunikado, kompreno, kaj kunlaboro.

Krome en 2004 estos speciala seminario por Esperanto-instruistoj pri modernaj instrumentoj.

La kursoj estas pagendaj, sed stipendioj haveblas. Por pliaj informoj, bv. telefonvoki al Ellen M. Eddy (360-754-4563), aŭ retmesaĝi al eddyellen@aol.com, aŭ skribi helikpoŝte al:

11736 Scott Creek Drive SW,  
Olympia WA 98512  
Usono

Por pliaj informoj, bv. viziti la retpaĝon de la NASK 2004:  
<http://www.sit.edu/esperanto/index.html>

# MEKARO la dua

## *MezKanadan Renkontiĝo*

Vi estas invitataj partopreni la 2<sup>an</sup> **MezKanadan Renkontiĝon** (MEKARO) kiu okazos en Montrealo dum la venonta majoj.

La pasintjara MEKARO sukcese okazis en Otavo. En 2004 ĝi devus esti en Kebeko sed la tiea E-grupeto ne sentis sin sufiĉe forta por ĝin organizi. La estraro de ESK decidis inviti la Esperantistaron en Montrealo anstataŭe.

MEKARO estas amikeca, turistuma semajnfino dum kiu vi povos praktiki Esperanton vizitante Montrealon. Vi ankaŭ konatiĝos (kaj ni esperu amikiĝos) kun Esperantistoj el diversaj lokoj. Gastigado povas esti en domo de esperantistoj aŭ ĉe

hotelo laŭ via deziro. Ne estas kotizo por aliĝi ĉar la gastiganta E-grupo zorgas pri tio sed vi devos mem pagi por la manĝoj, enirbiletoj (ekz. muzeo) kaj la enurbaj veturoj.

Notu, ke dum la semajnfino *ne* okazos kursoj, movadaj prelegoj aŭ simile. La celo de MEKARO estas pasigi semajnfinojn vizitante urbon uzante Esperanton.

Por helpi nin pli bone plani la semajnfinojn, bonvolu tamen aliĝi sendante vian nomon, kiom da personoj alvenos kaj kian tranoktadon vi elektas. Vi ricevos pliajn detalojn fruprintempe. Helpu nin plie, sendante la inviton al viaj samklubanoj.

En 2005, ni esperas, ke la Toronta Esperantistaro gastigos la 3<sup>an</sup> MEKAROn.

**Kio** : 2<sup>a</sup> MEKARO -  
MezKanada Renkontiĝo

**Kie** : Montrealo, Kebekio,  
Kanado

**Kiam** : Ekde la 22<sup>an</sup> de majoj (14<sup>a</sup>  
horo) ĝis lunde la 24<sup>an</sup> de majoj  
(fino post la tagmanĝo)

**Kotizo** : senpaga sed necesas  
anonci vian alvenon.

**Programo** : Urba vizito, komuna  
bufeda manĝo, libro-bazaro, kaj  
multe pli.

## Centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof

La 8<sup>an</sup> kaj 9<sup>an</sup> de oktobro 2004 la Aŭstria Nacia Biblioteko, en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, organizos simpozion okaze de du Esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904 – 1942) kaj la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929).

Prelegos Ulrich Lins (Germanio/Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos Benczik (Hungario), Wera kaj Detlev Blanke (Germanio), Heiner Eichner (universitato de Vieno, Aŭstrio), Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), kaj Claude Piron (Svisio).

La historio de Esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligita al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de Esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich Lins per *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj*

*kontraŭ Esperanto*. Esperanto do ne estas io ekzotika kaj marĝena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed ĝi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunkto de la simpozio, kiu pritraktas la destinon de Esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de la Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: *Kia estas hodiaŭ la situacio de Esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter Esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel konduku la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj*

*teknologioj ofertas novajn eblecojn?*

Laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-Esperanta publiko – la cetero disvolviĝos en Esperanto.

Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en la Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia Cseh-kurso por tutkomencantoj.

(La germana nomo de la aranĝo estas: *Die gefährliche Sprache*)

Partoprenkotizo: 50 eŭroj, por studentoj kaj lernantoj 35 eŭroj. Aliĝo: planspraĉen@onb.ac.at

Christian Cimpa  
Sammlung für Planspraĉen und  
Internationales Esperanto-Museum  
d e r Ö s t e r r e i c h i s c h e n  
Nationalbibliothek  
Hofburg, Miĉaelerkuppel, AT-1010  
WIEN Tel.: 0043/1/ 535 5145



# L'espéranto au parlement jeunesse

**Au début de l'hiver, un jeune francophone du Yukon, Sébastien Dallaire, contactait la Société pour obtenir de la documentation qui lui permettrait de proposer l'utilisation de l'espéranto à l'occasion du parlement jeunesse fédéral. Nous lui avons expédié un exemplaire du livre Esperanto en moderna mondo. Voici son récit de son expérience...**

Oui, j'ai reçu les informations à temps et je vous en remercie beaucoup. Pour ce qui est de mon expérience

parlementaire oui, c'était incroyable. Quelle intensité! Contrairement à ce que je pensais, j'ai obtenu beaucoup de supporters, et ce, dès le début. Dans mon cas, c'était un débat et un vote sans ligne de partie: nous étions donc libres de choisir notre position selon nos opinions. Mon projet de loi n'a pas passé, mais seulement par sept voix.

Le verdict fut 39 pour et 46 contre. C'était un débat très émotionnel bien sûr puisqu'il était question de langue, mais je suis satisfait de mes arguments. J'ai tenu bon jusqu'au bout. Je ne suis pas du tout déçu que mon

projet de loi n'ait pas passé. Mon ultime but était de remettre en question différentes choses et en la matière, je peux affirmer que c'est mission accomplie. Je suis très fier de mon expérience. Je me suis vraiment engagé et je l'ai vécue à fond... Quelle expérience!

Pour ma part, maintenant, je songe à apprendre la langue et peut-être partir voyager dans la prochaine année par votre système de voyage que je trouve très intéressant. Enfin... cela reste à venir.

## Lingva Prismo

Lingva Prismo [www.lingvo.info](http://www.lingvo.info) estas paĝaro por junuloj. Gxi volas montri la buntecon kaj la diversecon de la lingvoj de la mondo kaj invitas al pensi pri la gardado de tiu kultura rikaĵo. Tion ĝi faras en amuza maniero. Lingva Prismo ekzistas en 7 lingvoversioj: Esperanto, angla, finna, franca, germana, pola kaj rusa. Ni nun planas novajn lingvoversiojn kaj priskribojn de lingvoj kaj skribsistemoj. Se vi volas kontribui al la kreskado de la paĝaro kun

tekstoj pri via lingvo aŭ traduki Lingvan Prismon al via lingvo, bonvolu kontakti nin ĉe [cornelia@lingvo.info](mailto:cornelia@lingvo.info).

Eble vi volas meti anoncon kaj ligilo de Lingva Prismo en viajn retpaĝojn. Por tio mi sendas la logotipon kaj simbolon al vi.

Antaŭdankon

Cornelia Blome

## Malfacilas krei ion !

Pasintjare la estraro de ESK estis feliĉa pro la starigo de nova E-klubo en Kebeko.

Kelkaj estuziasmaj Esperantistoj kunvenis kelkfoje por diskuti la aferon... sed fine ni aŭdis ke la ideo ne konkretiĝis. Nu, Jofo forlasis la regionon ĉar li ricevis postenon en Chicoutimi kaj li estis unu el la plej aktivaj en la kreo de tiu klubo. Evidentiĝis poste ke la intereso kaj

la opinioj pri agado tre malsamas inter la Kebekaj Esperantistoj kaj la projekto simple disfalis.

Ni bedaŭras sed tio ne signifas ke estas porĉiame la fino. Ni cetere kore invitas la Esperantistoj el la Kebeka regiono partopreni la aktivecojn en Montrealo por povi plibonigi sian lingvo-nivelon kaj ĝui la amikecon de Esperantio.

Normando

## La dure réalité !

L'an dernier, le C.A. de la SQE était heureuse de voir les efforts des espérantophones de Québec afin de créer un club local.

Quelques espérantophones se sont rencontrés à quelques reprises à l'Université Laval afin de mettre sur pied le Club d'espéranto de Québec. Peine perdue! Avec le départ de JF pour Chicoutimi (l'un des plus enthousiastes) et après avoir constaté que les intérêts et les points de vue étaient très divergents, l'idée ne sait tout simplement pas réalisée.

Nous en sommes désolés et espérons qu'il y aura une prochaine fois. En attendant, nous invitons les espérantophones et les amis de l'espéranto de la région de Québec (et de toute la province, bien sûr) à prendre part à y activités qui se tiennent à Montréal. Vous pourrez y pratiquer la langue dans une ambiance amicale.

# Venontaj aktivaĵoj de la Montreala Klubo

Por la regulaj monataj renkontiĝoj de novembro ĝis junio, ni proponas al vi novan aktivaĵon: ni hazarde prenis nomojn de landoj, kaj ni invitas vin pretigi 5-10-minutan paroladon pri tio, kion vi konas pri tiu lando. Estas bona maniero praktiki la lingvon!

Vendredo, la 27<sup>an</sup> de februaro 2004, je la 19:30 (temo: Nepalo)

Vendredo, la 26<sup>an</sup> de marto 2004, je la 19:30 (temo: Kvartvelio)

Vendredo, la 30<sup>an</sup> de aprilo 2004, je la 19:30 (temo: Nov-Zelando)

Vendredo, la 28<sup>an</sup> de majo 2004, je la 19:30 (temo: Tunio)

Vendredo, la 25<sup>an</sup> de junio 2004, je la 19:30 (temo: Slovenio)

Vendredo, la 24<sup>an</sup> de septembro 2004, je la 19:30

Vendredo, la 29<sup>an</sup> de oktobro 2004, je la 19:30

Vendredo, la 26<sup>an</sup> de novembro 2004, je la 19:30

## Prochaines activités du *Montreala Klubo*

Pour les réunions mensuelles ordinaires, de novembre à juin, nous vous proposons une nouvelle formule: nous avons pigé au hasard le noms de quelques pays. Nous vous invitons à préparer un petit exposé de 5 à 10 minutes sur ce que vous connaissez de ce pays. Une excellente occasion de pratiquer la langue!

Vendredi 27 février 2004, 19h30 (thème: Népal)

Vendredi 26 mars 2004, 19h30 (thème: Géorgie)

Vendredi 30 avril 2004, 19h30 (thème: Nouvelle-Zélande)

Vendredi 28 mai 2004, 19h30 (thème: Tunisie)

Vendredi 25 juin 2004, 19h30 (thème: Slovénie)

Vendredi 24 septembre 2004, 19h30

Vendredi 29 octobre 2004, 19h30

Vendredi 26 novembre 2004, 19h30

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto, en janvier, mai, septembre et novembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia sesfoje dum la jaro (januare, majo, septembro kaj novembro). Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90-oble. Senpage por la membroj de la ESK.

### Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta

**eldono: 2004.04.01**

jessylapointe@hotmail.com

Rédacteur en chef/Cefredaktoris Jessy LaPointe. Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/pr Prezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (vice-président/vicprezidanto), Sylvain Auclair (trésorier/kasisto), Jessy LaPointe

(secrétaire/sekretario) kaj Martin Benoit (administrateur/konsilanto).

**Esperanto-Societo Kebekia**  
**Société québécoise d'espéranto**

6358-A, rue de Bordeaux  
Montréal (Québec) H2G 2R8

Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151

esperanto@sympatico.ca

www.esperanto.qc.ca

## Realigu frue! Réabonnez-vous vite!

**Sylvain Auclair**

La estraro de ESK tre ŝatus, ke la membroj sendu sian realiĝilon (kun la pago, kompreneble...) tuj post la ricevo.

Tio estas des pli grava se oni samtempe reabonas al *Le Monde de l'Espéranto*. Ĉar ni devas mendi la ĝustan nombron da ekzempleroj, malfrua reabono povus kaŭzi tion, ke vi maltrafos unu numeron.

Les administrateurs de la Société apprécieraient beaucoup que les membres renvoient leur formulaire de réadhésion (avec le chèque, bien entendu...) dès qu'ils le reçoivent. Cela est d'autant plus important si, par la même occasion, on se réabonne au *Monde de l'Espéranto*. Comme nous devons commander le nombre exact d'exemplaires, un réabonnement trop tardif pourrait nous empêcher de vous faire parvenir tous les numéros correctement.